

VI FIERAS PRI VIA LANDO, LINGVO KAJ KULTURO, ŜATAS PREZENTI ĜIN AL SAMIDEANOJ ?

PARTOPRENU LA 41-an KONFERENCON DE ILEI KAJ ĜUU LINGVAN FESTIVALON!

Ni volas inviti vin partopreni en la Lingva Festivalo prezentota de ILEI ĉi jare en Portonovo, Benino. Kiel lastjare en Ranzan, ni prezentos niajn lingvojn dum mallongaj kursetoj kiuj daŭros nur 25-30 minutoj. Vi povos prezenti vian lingvon dum la festivalo laŭ la maniero kiun vi preferas.

Kiel en antaŭaj ILEI Konferencoj, ni utiligos parton de posttagmezo por la lingva festivalo. Vi povas nun enskribiĝi por prezenti la lingvon de via lando, sendante mesaĝon al Vladka Chvatalova ĉe sciuro@seznam.cz aŭ indiki tiun deziron plenigante Vian aliĝilon. Vi bezonas nur doni vian nomon, kaj la nomon de la lingvo kiun vi volas prezenti.

Se vi neniam partoprenis en Lingva Festivalo, ne zorgu ĉar ni donos al vi mallongan trejnadon en la unua parto de la ILEI Konferenco, kaj vi havos tempon por prepari la prezentadon de via lingvo.

Lastjare ni havis 20 lingvojn, kaj pli da instruantoj ĉar kelkaj kursetoj havis du, eĉ tri prezentantojn. Post kiam ni ricevos vian mesaĝon por prezenti vian lingvon, ni metos vian nomon kaj lingvon en la horaro de la Festivalo.

Por partopreni Lingvan Festivalon ne necesas aparte aliĝi — sufiĉas menciigi lingvon, kiun Vi prezentos en Via aliĝilo kaj pretigi gajan prezenton. Serĉu pliajn informojn pri la konferenco kaj Vi ekscios pri pliaj allogaj programeroj dum la tuta konferenco.

Gvidantino de kalkaj Lingvaj Festivaloj dum ILEI konferencoj Vladka Chvatalova diris: „Ankaŭ en Benino ni ŝatus organizi etan internan Lingvan Festivalon por montri al ĉiuj partoprenantoj, kio ĝi estas, kaj ebligi uzi tiun ĉi programeron en la estonta agado en diversaj landoj. La LF similas al foiro de intereso, kie ĉiuj partoprenantoj de la 41-a ILEI-konferenco estas invitataj prezenti sian landon kaj sian lingvon. Ĉiu prezentanto havos 25 minutojn ĉe speciale aranĝita stando kaj rajtos prezenti sian lingvon laŭ sia bontrovo. Eblas tute simple prezenti, paroli pri historio, gramatiko, geografia regiono aŭ ligita kulturo, aŭ veni vestita per naciaj vestaĵoj, kunporti naciajn manĝojn, aŭskultigi nacian muzikon, naciajn dancojn k. t. p.“ Kutime estas prezentataj, depende de la tuta nombro, 4-5 lingvoj samtempe, kaj sekvas 3-4 paralelaj duonhoraj prezentadoj. Dum niaj konferencoj ni uzas 25 minutojn por prezenti ĉiun lingvon, sed ankaŭ ekzistas festivaloj kun ekzemple 1-horaj prezentadoj. Ebla strukturo de la prezento povas esti ekzemple (ne nepre!):

1. Historio de la lingvo — 3 min.
2. Nuna geografia regiono de uzado de la lingvo — 2min.
3. Prezento de ĉefaj gramatikaĵoj de la lingvo — 5min.
4. Ekzemploj de tipaj esprimoj, salutvortoj ktp. — 7 min.
5. Nacia kulturo, ligita kun la lingvo — 8 min.
6. Ekzemploj de sonanta lingvo — 5 min.

Principe ne ekzistas ununura maniero por tia prezento, iu preferas esti pli serioza, iu prezentas en sia duonhora kvazaŭ komedion. Komence de la konferenco okazos kunveno, dum kiu ni ankoraŭ pli detale klarigos, kiel prepari prezentadon de lingvoj, do ne timu proponi vin mem!

En Portonovo ni fakte ne planas publikan prezenton, nur kvazaŭ "laborseminaron" pri preparado de lingvaj prezentadoj kaj etan internan festivalon, por prezenti al afrikaj samideanoj kaj instrui al ili kiel poste utiligi tiun eblon dum aliaj eventoj.



NE PERDU EBLECON PREZENTI VIAN IDENTECON AL VASTA MONDO!

**La 41-a Konferenco de ILEI en Portonov (Benino)
29 julio -05 aŭgusto 2008**

Esperanto instruistoj por planedo Tero

Se Vi ne povas veni persone kaj ĉeesti la konferencon fizike — ni ege petas Vin *subteni* la konferencon per financa helpo kaj subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapablighado de junaj instruistoj el Afriko per enpagoj al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko „Benino 2008“. Sed pli bone plenigi aliĝilon en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php> kaj partopreni en la unua en historio granda internacia porinstruista E-aranĝo en Afriko. Informoj pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en <http://www.ilei.info/novajxoj/Portonovo.php>. Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn — Vi ĉiam estas bonvena skribi al: Aida Čížkaitė aidute@mail.lt (ILEI-estrarano pri konferencoj) kaj Charles Alofa alofkarlo@yahoo.fr (prezidanto de LKK).

**Afriko de proksime —
ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ Viaj okuloj!**

BONVENON!